

REFERENCITAJ ORIGINOJ

Mallongigoj : DN-Dīgha Nikāya
 MN-Majjhima Nikāya
 SN-Saṃyutta Nikāya
 AN-Aṅguttara Nikāya

Sekcio *Paĝo* *Linio* *Origino*

BUDHO

Ĉapitro 1

1	2	1	Diversaj Sutroj
	4	19	AN 3-38, Sukhumālā-sutta
	5	10	MN 3-26, Ariyapariyesana-sutta
	5	21	Diversaj Sutroj
	6	21	MN 9-85, Bodhirājakumāra-sutta
	7	1	Diversaj Sutroj
	7	10	Sutta-nipāta 3-2, Padhāna-sutta
	7	16	Diversaj Sutroj
	8	5	Vinaya, Mahāvagga 1
	9	5	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta
2	10	13	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta
	11	9	Parinibbāna-sutta
	13	7	Parinibbāna-sutta
	13	13	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta

Ĉapitro 2

1	15	1	Amitāyur-dhyāna kaj Vimalakīrti- nirdeśa sūtras
	15	6	Śūraṃgama-sūtra

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Origino</i>
	15	11	Vimalakīrtinirdeśa kaj Mahāparinirvāṇa sūtras
	16	4	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 16
	17	1	Mahāyāna-jātaka-cittabhūmi-parīkṣa-sūtra
	17	7	Mahāparinirvāna-sūtra
2	19	1	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 3
	20	1	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 4
	21	9	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 5
3	22	15	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 16

Ĉapitro 3

1	25	1	Avataṃsaka-sūtra 5
	26	3	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	26	9	Avataṃsaka-sūtra
	26	17	Suvarṇaprabhāsottamarāja-sūtra 3
2	29	8	Avataṃsaka-sūtra
	29	14	Avataṃsaka-sūtra 34, Gaṇḍa-vyūha
	29	17	Malgranda Sukhāvativyūha-sūtra
	30	2	Avataṃsaka-sūtra
	30	6	SN 35-5
	30	9	Mahāparinirvāṇa-sūtra
3	32	10	MN 8-77, Mahāsakulūdayi-sutta
	33	8	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	33	19	Laṅkāvatāra-sūtra
	34	6	Avataṃsaka-sūtra 32
	34	21	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 25
	34	25	Mahāparinirvāṇa-sūtra

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Origino</i>
	35	13	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 2
	35	19	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 3

DARMO

Ĉapitro 1

1	38	1	Vinaya, Mahāvagga 1-6 kaj SN56-11-12, Dhammacakka- pavattana-sutta
	39	14	Itivuttaka 103
	40	1	MN 2, Sabbāsava-sutta
	40	8	Sūtra Kvardek Du Ĉapitroj 18
2	41	8	Śrīmālādevīsīḥanāda-sūtra
3	43	1	Avataṃsaka-sūtra 22, Daśa- bhūmika

Ĉapitro 2

1	46	1	MN 4-35, Cūlasaccaka-sutta
	48	11	AN 5-49, Muṇḍarāja-vagga
	49	1	AN 4-185, Samaṇa-sutta
	49	7	AN 3-134, Uppāda-sutta
2	49	13	Laṅkāvatāra-sūtra
	49	16	Avataṃsaka-sūtra 2
	50	6	Avataṃsaka-sūtra 16
	50	16	Avataṃsaka-sūtra 22, Daśa- bhūmika
	51	4	Laṅkāvatāra-sūtra
	51	9	AN 4-186, Ummagga-sutta

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Origino</i>
	51	13	Dhammapada 1, 2, 17, 18
	52	2	SN 2-1-6, Kāmada-sutta
3	52	13	Avataṃsaka-sūtra 16
	53	1	Laṅkāvatāra-sūtra
	53	15	MN 3-22, Alagaddūpama-sutta
	54	1	Laṅkāvatāra-sūtra
	54	14	Laṅkāvatāra-sūtra
4	57	6	Vinaya, Mahāvagga 1-6
	57	19	Laṅkāvatāra-sūtra
	58	5	SN 35-200, Dārukhandha-sutta
	58	13	Laṅkāvatāra-sūtra en altele
	59	5	MN 2-18, Madhupiṇḍika-sutta
	59	18	Laṅkāvatāra-sūtra
	60	11	Laṅkāvatāra-sūtra
	61	10	Vimalakīrtinirdeśa-sūtra
	63	12	Avataṃsaka-sūtra 34, Gaṇḍa- vyūha
	63	21	Laṅkāvatāra-sūtra en altele
 Ĉapitro 3			
1	65	1	Vinaya, Mahāvagga 1-5
	65	15	Vinaya, Cūlavagga 5-21
	66	3	Śūraṃgama-sūtra
2	71	10	Śūraṃgama-sūtra
	73	8	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	73	15	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 7 kaj Śūraṃgama-sūtra
	74	5	Avataṃsaka-sūtra 32

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Origino</i>
	74	10	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	74	15	Brahmajāla-sūtra
	75	2	Mahāparinirvāṇa-sūtra
3	75	20	Mahāparinirvāṇa-sūtra
Ĉapitro 4			
1	81	1	Śrīmālādevīsīmhanāda-sūtra
	82	8	AN 2-11
	82	13	Itivuttaka 93
	82	20	Vinaya, Mahāvagga
	83	8	AN 3-68, Aññātiṭṭhika-sutta
	83	23	AN 3-34, Ālavaka-sutta
	84	14	Vaipulya-sūtra
	84	20	Vinaya, Mahāvagga 1-6, Dhamma- cakkpravattana-sutta
	85	3	MN 2-14, Cūḷadukkhakkhandha- sutta
	85	17	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	86	18	Itivuttaka 24
2	88	13	MN 6-51, Kandaraka-suttanta
	89	7	AN 3-130
	89	15	AN 3-113
3	90	6	Itivuttaka 100
	90	16	Sūtra de Parabolo
	91	15	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	93	2	AN 3-62
	93	17	AN 3-35, Devadūta-sutta
	93	21	Therīgāthā Aṭṭhakathā

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Origino</i>
4	95	18	Sukhāvātīvyūha-sūtra vol.2
Ĉapitro 5			
1	102	1	Sukhāvātīvyūha-sūtra vol.1
	105	18	Sukhāvātīvyūha-sūtra vol.2
	107	5	Amitāyur-dhyāna-sūtra
2	110	15	Malgranda Sukhāvātīvyūha-sūtra

LA VOJO DE PRAKTIKO

Ĉapitro 1			
1	116	1	MN 2, Sabbāsava-sutta
	117	21	MN 3-26, Ariyapariyesana-sutta
	118	11	SN 35-206, Chapāna-sutta
	119	8	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 41-2
	121	18	MN 2-19, Dvedhāvitakka-sutta
	122	14	Dhammapada Aṭṭhakathā
2	123	12	AN 3-117
	124	3	MN 3-21, Kakacūpama-sutta
	127	4	MN 3-23, Vammīka-sutta
	128	14	Jātaka IV-497, Mātaṅga-Jātaka
	132	5	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 9
	132	14	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 11
	132	10	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 13
	134	8	AN 2-4, Samacitta-sutta
3	135	3	Samyuktaratnapīṭaka-sūtra
	140	10	Upamā-śataka-sūtra

Sekcio *Paĝo Linio* *Origino*

143	12	Mahāprajñāpāramitā-upadeśa- śāstra
144	22	Mahāparinirvāṇa-sūtra
145	17	Samyuktaratnapiṭaka-sūtra

Ĉapitro 2

1	150	1	MN 7-63, Cūlamālunkya-sut-tanta
	152	4	MN 3-29, Mahāsāropama-sutta
	153	20	Mahāmāyā-sūtra
	154	11	Theragāthā Aṭṭhakathā
	156	5	MN 3-28, Mahāhatthipadopa-ma- sutta
	156	19	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	157	10	Avadānaśataka-sūtra
	158	16	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	160	11	Pañcaviṃśatisāhasrikā- prajñāpāramitā-sūtra
	161	18	Avataṃsaka-sūtra 34, Gaṇḍa-vyūha
2	163	11	AN 3-88
	164	9	AN 3-81
	164	17	AN 3-82
	165	11	Parinibbāna-sutta vol.2
	166	9	MN 14-141, Saccavibhanga-sutta
	167	16	Parinibbāna-sutta vol.2
	168	11	AN 5-16, Bala-sutta
	168	16	Avataṃsaka-sūtra 6
	169	15	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	170	1	Samyuktaratnapiṭaka-sūtra

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Origino</i>
	170	15	Suvarṇaprabhāsa-sūtra 26
	171	6	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	172	6	Theragāthā Aṭṭhakathā
	172	21	Jātaka 55, Pañcāvudha-Jātaka
	174	4	Itivuttaka 39 kaj 40
	174	11	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	174	14	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	174	20	AN 5-12
	175	6	Parinibbāna-sutta
	175	15	Śūraṃgama-sūtra
3	177	3	SN 55-21 Kaj 22, Mahānāma-sutta
	177	18	AN 5-32, Cundī-sutta
	178	6	Vimalakīrtinirde'sa-sūtra
	178	19	Śūraṃgama-sūtra
	179	5	Sukhāvatīvyūha-sūtra vol.2
	179	15	SN 1-4-6
	179	18	Avataṃsaka-sūtra 33
	180	16	Avataṃsaka-sūtra 24
	181	7	Suvarṇaprabhāsa-sūtra 4
	181	16	Amitāyur-dhyāna-sūtra
	181	19	Sukhāvatīvyūha-sūtra
	182	3	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	183	1	MN 2-16, Cetokhila-sutta
	183	15	Sukhāvatīvyūha-sūtra vol. 2
4	184	13	Dhammapada
	191	20	SN 1-4-6
	192	8	AN
	192	12	Mahāparinirvāṇa-sūtra

LA KOMUNUMO

Ĉapitro 1

1	194	1	Itivuttaka 100 kaj MN 1-3, Dhammadāyāda-sutta
	194	7	Itivuttaka 92
	194	16	Vinaya, Mahāvagga 1-30
	195	15	MN 4-39, Mahā-assapura-sutta
	197	1	MN 4-40, Cūḷa-assapura-sutta
	198	1	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 10
	198	6	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 10
	198	15	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 14
2	200	1	SN 55-37, Mahānāma-sutta
	200	11	AN 3-75
	200	18	SN 55-37, Mahānāma-sutta
	201	4	SN 55-54, Gilāyanaṃ-sutta
	201	9	Avataṃsaka-sūtra 22
	203	1	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	206	5	Avataṃsaka-sūtra 7
	209	5	Mahāmāyā-sūtra
	210	5	Avataṃsaka-sūtra 21
	211	2	Mahāparinirvāṇa-sūtra
3	212	1	DN 31, Siṅgālovāda-sutta
	217	9	AN 2-4, Samacitta-sutta
	218	7	AN 3-31
	218	14	Jātaka 417, Kaccāni-Jātaka

<i>Sekcio</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>	<i>Origino</i>
	220	7	DN 31, Singālovāda-sutta
	220	16	Dhammapada Aṭṭhakathā 1
	222	6	(Birmaj Komentarioj)
	222	21	Śrīmālādevāsīmhanāda-sūtra
Ĉapitro 2			
1	225	1	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	226	16	AN 3-118, Soceyyan-sutta
	228	13	SN
	229	5	Vinaya, Mahāvagga 10-1 Kaj 2
	229	13	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta
	231	1	Vinaya, Mahāvagga 10-1 Kaj 2
2	234	1	SN
	234	19	Antarābhava-sūtra
	235	6	Vimalakīrtinirdeśa-sūtra
	236	11	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	237	7	Malgranda Sukhāvātīvyūha-sūtra
	237	13	Sukhāvātīvyūha-sūtra
	238	6	Vimalakīrtinirdeśa-sūtra
3	238	15	Dhammapada Aṭṭhakathā 1
	239	7	AN 34-2
	240	1	Dhammapada Aṭṭhakathā 1
	240	16	AN 5-1
	241	1	Mūla-sarvāstivāda-vinaya
			San.ghabheda-vastu 10
	241	14	MN 9-86, Aṅgulimāla-sutta
	242	14	AN 26

APENDICOOJ

KONCIZA HISTORIO DE BUDHISMO

– Disvastiĝo de Hindio al Japanio –

1. HINDIO

En la spirita historio de homaro oni spertis unu el la plej gravaj epokfaraj okazintaĵoj, kiam la “Lumo de Azio” estis lanĉita, brilante en la centra parto de Hindio, alivorte, kiam la fonto de Granda Saĝo kaj Kompato ŝpruciĝis kaj daŭre riĉigadis la homan menson dum multaj jarcentoj ĝis hodiaŭ.

Budho Gaŭtamo, kiu estas konata de postaj budhanoj kiel Ŝakjamunio aŭ la “Sanktulo de Ŝakja klano”, forlasis sian hejmon, fariĝis ŝramano kaj direktis sian paŝon suden al Magado. La tempo, kiam Li fine atingis Vervekiĝon sub la Bodhi-arbo tie, estis supozeble en la mezo de la 5-a jarcento a.K. Li daŭris sian senlacan klopodon prediki la instruon de Saĝo kaj Kompato, dum kvardek kvin jaroj de la Vervekiĝo ĝis la “Granda morto”, per kiu Li eniris en “Plenan Nirvanon”. Rezulte de tio gravaj budhanoj konstante aperadis en diversaj regnoj kaj triboj en la meza Hindio.

Dum la tempo de Reĝo Aŝoko (regis 268 - 232 a.K.), la tria reĝo de la Maŭrja dinastio, la instruo de Budho Gaŭtamo disvastiĝis ne nur tra la tuta Hindio sed ankaŭ trans la landlimoj.

La Maŭrja dinastio estis la unua unuiĝinta reĝolando en Hindio. Tiu ĉi reĝolando en la tempo de la unua reĝo, Ĉandragupto (regis ĉirkaŭ 317 - 293 a.K.), jam posedis vastan teritorion etendiĝantan al la Himalajaj montoj en la nordo, al la golfo de Bengalo en la oriento, al la Hindukuŝa montaro en la okcidento, kaj trans la Vindja montaro en la sudo. Reĝo Aŝoko plie etendis sian teritorion al la Dekkana altebenaĵo, konkerinte Kalingon kaj aliajn landojn.

Laŭdire Aŝoko estis tre furioza en sia naturo, tial li estis nomata Ĉandaŝoko (la furioza Aŝoko). Sed lia karaktero montris kompletan ŝanĝiĝon, kiam li propraokule vidis la tragikajn scenojn okazigitajn de la milito, en kiu Kalingo estis venkita, kaj poste li fariĝis fervora kredanto de la instruo de Saĝo kaj Kompato. Li entreprenis multajn aferojn kiel budhano, el kiuj la sekvantaj du laboroj estas la plej notindaj.

La unua temas pri la “Ediktoj de Aŝoko”, kiuj restas sur ŝtonaj kolonoj aŭ sur poluritaj rokmuroj kun gravuritaj tekstoj enhavantaj la instruon de Budho. Li konstruis ilin en multaj lokoj por disvastigi la instruon de Budho. La dua laboro estis, ke li sendis misian delegacion al la ĉirkaŭaj landoj trans la landolimo por disvastigi instruojn de Saĝo kaj Kompato. Precipe rimarkinda estas la fakto, ke kelkaj misiaj delegacioj estis senditaj al tiaj malproksimaj lokoj, kiaj Sirio, Egiptio, Cirenio, Makedonio kaj Epiro. Budhismo estis disvastigita malproksime kaj vaste al la Okcidento. Plie Mahendra (en Pali, Mahinda), sendita al Tāmraparni aŭ Cejlono, sukcesis en “konstruado de la bela instruo sur la bela Lankādvīpa (en Pali, Lankādīpa)” kaj tiel fondis la deirpunkton de la tiel nomata Suda Budhismo en la insulo.

2. LA LEVIĜO DE MAHAJANA BUDHISMO

Budhanoj de postaj jaroj ofte uzas la esprimon “Budhisma Movado al la Oriento”. Sed dum pluraj jarcentoj antaŭ Kristo, la vizaĝo de Budhismo estis evidente turnita al la Okcidento. Estis ĉirkaŭ la komenco de kristana erao, ke la vizaĝo de Budhismo turniĝis al la Oriento. Tamen, antaŭ ol paroli pri tiu ĉi afero, ni devas mencii la grandan ŝanĝiĝon, kiu okazis en Budhismo. Tiu ĉi ŝanĝiĝo estas nenio alia ol la “Nova Ondo”, kiu estas konata kiel

la Mahajana Budhismo, aŭ Granda Veturilo de Budhismo, kiu tenis fortan radikon kaj aperis kiel rimarkinda elemento tiutempe.

Kiam, kiel, kaj de kiu tia “Nova Ondo” ekestis? Neniu povas respondi decide kaj klare tiujn ĉi demandojn, ĉar troviĝas diversaj hipotezoj, kiuj kontraŭstaras unu la alian, kaj budhologoj ankoraŭ nun diskutadas pri tiu ĉi temo. Tamen oni povas diri, ke ĉirkaŭ la komenco de kristana erao ekzistis kelkaj Mahajanaj sutroj. Kaj kiam Nagarĝuno disvolvis eminentan ideologion surbaze de la Mahajanaj sutroj, Mahajana Budhismo okulfrappe aperis sur la scenejo de la budhisma historio.

La rolo, kiun ludis Mahajana Budhismo, estas tre grava en la longa historio de Budhismo. Kiel ni en pliposta ĉapitro klarigos, kaj en Ĉinio kaj en Japanio Budhismo tra la tuta historio disvolviĝis sub la influo de la Mahajana instruo. Tio ĉi ne estas mirinda, ĉar Mahajano levis la novan idealon savi popolamason, kaj oni supozis la novan figuron, Bodisatvon, kiu efektivas tiun ĉi idealon. Krome, por subteni la idealon Mahajanaj ideologoj naskis grandiozajn intelektajn rezultojn en metafizikaj kaj psikologiaj sferoj. Tiel ĝi unuflanke sekvis la instruon de Budho Gaŭtamo, kaj aliflanke aldonis multajn novajn ideojn al ĝi. Pro tio Budhismo fariĝis plenplena de ardo kaj energio kaj riĉigis la landojn en Oriento kvazaŭ torenta rivero.

3. LA CENTRA AZIO

Pere de la Centra Azio ĉinoj por la unua fojo akceptis Budhismon. Tial, por montri kiel ĝi disvolviĝis el Hindio al Ĉinio, estas necese paroli pri Silka Vojo. Tiu ĉi vojo pasis tra la dezertaj regionoj en la Centra Azio, ligante Okcidenton kun Oriento. Tiu ĉi

komerca vojo estis farita en la epoko de Reĝo Wu de Han-dinastio (140 - 87 a.K.). En tiu epoko la teritorio de Han disvastiĝis al la malproksima Okcidento, kaj en najbaraj landoj kiel Ferghana, Sagdiana, Tukhara kaj eĉ Parthia, la spirito de komercisto, kiu estis antaŭe instigita de Aleksandro la Granda, estis ankoraŭ forte vigla. Laŭ tiu ĉi antikva vojo, kiu pasis tra tiuj ĉi landoj, silko ludis la plej gravan rolon. Tial ĝi estis nomata Silka Vojo. De tiu ĉi epoko ĉirkaŭ la komenco de kristana erao Hindio kaj Ĉinio komencis kulturen kontakton per la komerca vojo. Tial oni povas diri, ke la vojo estis ankaŭ la vojo de Budhismo.

4. ĈINIO

La historio de Ĉina Budhismo komenciĝis, kiam ĉinoj akceptis la Budhismajn sutrojn kaj entreprenis iliajn tradukojn. Laŭdire la plej malnova traduko en la antikva epoko estas “*si-shi-er-zhang-jing*” (Sutro de kvardek du Ĉapitroj), kiun tradukis Kāśyapa Mātāṅga kaj aliaj dum la Jongping erao (58 -75 p.K.) de Reĝo Ming de la Donghan-dinastio; hodiaŭ tamen sciencistoj diras, ke tiu ĉi aserto estas dubinda kaj estas nur legendo. La plej malnovajn tradukojn faris An Shigao, kiu laboradis en Luoyang de ĉ. 148 ĝis ĉ.171 p.K. Ekde tiu ĉi tempo ĝis tiu en la Beisong-dinastio (960 - 1127) la tradukado daŭris dum proksimume mil jaroj.

Dum la fruaj jaroj tiuj, kiuj ludis ĉefan rolon en la enkonduko de la sankta skribo kaj ĝia traduko, estis plejparte monaĥoj el landoj de la Centra Azio. Ekzemple, An Shigao, supre menciita, devenis de Parthia; Saṃghavarman (ĉin-nome, Kan Sengkai), deveninta de Samarkando, alvenis al Luoyang ĉirkaŭ la tria jarcento kaj tradukis “*sukhāvātīvyūha sūtra*” (la Sutro de la

Budho de Nemezurebla Vivo); Dharmarakṣa (ĉin-nome, Zhu Fahu), tradukinto de la “saddharma puṇḍarīka sūtra” (la Sutro de la Blanka Lotuso de la Sublima Darmo), devenis de Tukhara kaj rezidis en Luoyang kaj poste en Chang’an ekde la lasta duono de la tria jarcento ĝis la komenco de la kvara jarcento. Kiam Kumārajīva, kiu devenis de Kucha, agadis en la frua parto de la kvina jarcento, la traduka laboro en Ĉinio kulminis.

Ekde tiu ĉi tempo komenciĝis aktiva laboro de la monaĥoj, kiuj vizitis Hindion el Ĉinio por lerni Sanskriton kaj rekte pristudi la instruon de Budho. La pioniro de tiaj monaĥoj estis Fa Xian (337 - 422). En 399 li iris de Chang’an al Hindio kaj revenis hejmen post dek kvin jaroj. La plej rimarkinda el tiuj ĉi monaĥoj, kiuj vizitis Hindion, estis Xuan Zang (602 - 664), kiu alvenis al Hindio en 627 kaj revenis en 645, post longa studado dum dek naŭ jaroj. Yi Ching (635 - 713) alvenis al Hindio laŭ mara vojo en 671 kaj revenis per la sama vojo post dudek kvin jaroj.

Tiuj ĉi monaĥoj vizitis Hindion de sia propra volo por lerni Sanskriton kaj alportis la sanskritan sanktan skribon de si preferitajn, kaj en sia hejmo ludis gvidan rolon en la traduka laboro de la originalaj tekstoj. Precipe la lingva kapablo de Xuan Zang estis rimarkinde elstara, kaj per lia energia laboro la tradukado de sankta skribo en Ĉinio atingis la kulminon. Dum la laboroj de fruaj pioniroj, kiuj estas reprezentataj de Kumārajīva, estas nomataj “malnovaj tradukaĵoj”, la laboroj de Xuan Zang kaj pli postaj tradukaĵoj estas nomataj “novaj tradukaĵoj” de la studantoj en posta epoko.

Sur la bazo de tiuj ĉi multege da volumoj de la Budhisma sankta skribo, kiujn ili tradukis el Sanskrito, ĉinaj budhanoj pli kaj pli inklinis al la ĉineska aŭ ĉineca pensmaniero en la sfero de ideologio aŭ religio. Tie evidente aperis karaktero, postulo kaj konfido de la nacio. La monaĥoj en la frua tempo precipe turnis

sian atenton metafizikan al “Ŝunjato” kiu estas karakteriza ideo de tiel nomataj “Praĝnaj” sutroj. Tiu ĉi tendenco estas videbla ankaŭ en la fakto, ke ili forĵetis “Hinajanon”, malgrandan veturilon, kaj turnis sian atenton ekskluzive al “Mahajano”, granda veturilo. Kaj tiu ĉi tendenco pli kaj pli fariĝis notinda en Tiantai Skolo kaj fine atingis la lastan etapon, kiam aperis Zen Skolo.

En la lasta duono de la sesa jarcento Tiantai Skolo estis kompletigita, kiam aperis Zhi Yu, Majstro Tiantai (538 - 597), la tria patriarko de la skolo. Li estis unu el la plej rimarkindaj pensuloj de Budhisma filozofio, kaj elpensis la sisteman kaj kritikan klasifikon de ĉiuj instruoj de Budho; ĝi, nomata “klasifiko laŭ kvin periodoj kaj ok doktrinoj”, havis tre fortan kaj vastan influon sur la ĉina kaj la japana Budhismoj dum longa tempo.

Multege da sanktaj skriboj venis al Ĉinio tute senorde kaj tradukiĝis sinsekve senkonsidere al historiaj detaloj. Ili enhavas diversajn enhavojn, eĉ kontraŭstarajn inter kelkaj tekstoj. Starante antaŭ multege da tekstoj, ĉinaj budhanoj nun sentis bezonon klarigi, kiel la tekstoj naskiĝis, kian valoron la tekstoj havas, kiel ili komprenas la tuton de Budhimo, kaj sur kiu instruo ili sin bazas. Jen estas la motivo de la klasifiko, kiu havas plurajn variantojn. Tiusence la klasifiko estis antaŭ ĉio entrepreno de ĉineska ideologio. Precipe tiu de Zhi Yu estis la plej sistema kaj konvinka. Sed kiam la moderna studo de Budhismo estis enkondukita, lia influo reganta dum longa tempo venis al la fino.

En la historio de Budhismo en Ĉinio “kiu venis la lasta” estis Zen Skolo. Oni diras, ke la fondinto de tiu ĉi skolo estis Bodidarmo (sanskrite, Bodhidharma) (? - ?), monaĥo el Hindio. La semo semita de li pompe ekfloris nur post la periodo de Hui Neng (638 - 713), la sesa patriarko de la skolo. Kaj post la oka jarcento, la skolo de Ĉinio naskis sinsekve talentajn pastrojn,

alportante prosperon de Zeno dum kelkaj jarcentoj.

En la Zena Budhismo oni trovis novan pensmanieron, kiu estas esprimata kiel “ĝusta heredo el la fondinto” aŭ “heredo ekster skribaĵo”. Tradicie la instruo de Budho estas nenio alia ol sutro, t.e. skribita instruo. Sed Zenaj budhanoj asertas, ke la ĝusta instruo estis transdonita ne de sutro sed de rekta sperto. Jen la pensmaniero, kiu bazas sin profunde sur karaktero de ĉinoj, kaj ĝi estas certe ĉineska budhismo. Sed la instruo de Budho Gaŭtamo kun tiu ĉi freŝa fluo, fariĝis pli granda rivero kaj riĉigas la landojn en Oriento.

5. JAPANIO

La historio de Budhismo en Japanio komenciĝis en la sesa jarcento. En 538 la reĝo de Bakje (antikva lando en korea duoninsulo) delegis sian ambasadoron por donaci statueton de Budho kaj sutrojn al la reĝa kortego de Mikado Kimmei. Tio ĉi markis la unuan enkondukon de Budhismo en tiu ĉi lando. La historio de Budhismo en Japanio havas pli ol 1400 jarojn

En la longa historio de japana Budhismo, ni povas montri la tri gravajn punktojn.

La unua estas fokusita al la Budhismo dum la 7-a kaj 8-a jarcentoj. Se montri tion ĉi materie, ni povas elekti la periodon ekde la konstruo de la templo Hōryū-ji (607) ĝis tiu de la templo Tōdai-ji (752). Retrorigardante tiun ĉi periodon, ni devas ne forgesi, ke tiam kultura tajdo sin levis eksterordinare tra la tuta Azio. Dum la civilizacio de Okcidento estis fermita en profunda mallumo, tiu de Oriento estis disvolviĝanta en brila aktiveco kaj grandioza movado. En Ĉinio, Centra Azio, Hindio kaj aliaj sudaj

maraj landoj, la agema movado en la intelekta, religia kaj arta kampoj prosperis. Partoprenante en tiu ĉi movado, la aktiva humanisma tajdo de Budhismo estis lavanta la Orientan mondon. Kaj la nova movado de la japana kulturo, kiel oni povas vidi en la konstruaĵoj de brilanta Hōryū-ĵi aŭ la grandioza Tōdai-ĵi, kaj ankaŭ en la bunte glora religia kaj arta movado koncernanta ilin, montras la spiradon en Ekstrema Oriento de kultura tajdo, kiu estis kovranta ĉiujn vastajn areojn de Azio.

La popolo de tiu ĉi lando, kiu estis en necivilizita stato dum longa tempo, nun sin banis en la fluo de granda kulturo kaj la floro de civilizacio; la floro de civilizacio subite ekfloris. Tiel estis la turniĝo al bona feliĉo, kiu favoris Japanion en tiuj jarcentoj. Kaj la protagonisto, kiu respondis al la leviĝo de tiu ĉi kulturo, estis nenio alia ol Budhismo. Tiutempe Budhanaj temploj estis la centroj de internacia brilanta kulturo, monaĥoj estis la kleruloj de la novaj scioj, kaj sutroj estis la vehikloj portantaj elstarajn ideologiojn. Tie disvolviĝis la vasta kaj granda kulturo super religio. Tia estis la aktuala stato de Budhismo transportita al tiu ĉi lando en la komenca tempo.

En la naŭa jarcento, du grandaj monaĥoj, Saichō (Dengyō Daishi, 767-822) kaj Kūkai (Kōbō Daishi, 774-835) aperis en la sceno kaj fondis du Budhismajn skolojn, kiuj kune reprezentas la tiel nomatan Heian-Budhismon. Jen estas la komenco de la japana Budhismo en vera senco. La du majstroj reprenis Budhismon en ĝia originala signifo kaj fondis la centrajn templojn sur la montoj Hiei kaj Kōya respektive, kiel la aŭtentikajn praktikejojn, dum ĝistiam Budhismo instalas templojn en grandaj urboj kaj foje emis servi al aristokrataj distraĵoj. Poste dum tri jarcentoj la du skoloj prosperis ĉefe inter aristokratoj kaj en reĝa kortego.

La dua punkto estas fokusita al la Budhismo de la 12-a ĝis la 13-a jarcento. Tiam aperis grandaj monaĥoj, kiel ekzemple

Hōnen (1133-1212), Shinran (1173-1262), Dōgen (1200-1253), Nichiren (1222-1282) k.t.p. Eĉe hodiaŭ, parolante pri Budhismo de nia lando, ni neniam povas pretespasi la nomojn de tiuj ĉi grandaj monaĥoj. Kial ĝuste en tiuj ĉi jarcentoj naskiĝis tiaj grandaj pastroj? Tio estas pro tio, ke komuna tasko en tiu ĉi tempo alfrontis tiujn ĉi majstrojn. Kio do estis la komuna tasko? Ĝi estis akcepto de Budhismo konforma al japana mensa klimato.

Eble iuj demandas, “Kial? Ĉu ne estis vere, ke Budhismo estis enkondukita en tiun ĉi landon jam antaŭ longe?” Sed estas ankaŭ vere, ke por sufiĉe digesti kaj reformi la enkondukitan religion kaj fari ĝin komplete sia propra posedaĵo, kelkaj jarcentoj estis necesaj. Alivorte, en la 7-a kaj 8-a jarcentoj la klopodoj akcepti Budhismon en tiu ĉi lando komenciĝis, kaj kiel la rezulto de la klopodoj, la religio ekfloris per la manoj de la supre menciitaj majstroj en la 12-a kaj 13-a jarcentoj.

Poste Budhismo en Japanio sur la bazo konstruita de tiuj ĉi rimarkindaj majstroj tenis sian postan honoron ĝis hodiaŭ. Post tio tamen jam ne aperis brilo en la japana Budhismo. Sed ŝajnas, ke estas ankoraŭ unu rimarkindaĵo. Ĝi estas la frukto alportita de la esplorado de la origina Budhismo en la moderna budhologio.

Ekde la komenco ĝis hodiaŭ Budhismo en Japanio preskaŭ ĉiam estis Mahajana, sub la influo de la ĉina Budhismo. Precipe post la apero de la grandaj majstroj en la 12-a kaj 13-a jarcentoj, la Mahajana instruo formis ĉefan fluon kun la sekta fondinto kiel ĝia centro, kies doktrino daŭras ĝis hodiaŭ. En la historio de Budhismo en Japanio la studo de la origina Budhismo komenciĝis nur en la mezo de Meiji-erao. La figuro de Budho Gaŭtamo freŝe reaperis antaŭ tiuj, kiuj foje estis forgesintaj la fakton, ke krom la sektaj fondintoj estas la fondinto de Budhismo. Kaj tiuj, kiuj turnis atenton nur al la Mahajana instruo, nun povis klare ekkompreni, ke ankaŭ troviĝas la sistema instruo de Budhismo ekster

Mahajano. Kvankam ĝi ankoraŭ restas en la sfero de scienca intereso kaj ne sufiĉe elvokis novan religian patoson de popolamaso, almenaŭ estas la fakto, ke scioj pri Budhismo, kiujn havas la popolo de tiu ĉi lando, estas draste ŝanĝiĝantaj. Mi, la verkinto de tiu ĉi artikolo, metante emfazon sur tiu ĉi fazo, faru ĝin la tria aŭ la lasta punkto el la tri supre menciitaj.

TRANSIGO DE BUDHISMA KANONO

Budhismo estas religio, kiu estas konstruita sur la instruo, kiun Ŝakjamunio donis dum kvardek kvin jaroj. Tial la vortoj, kiujn Li uzis en sia prediko, havas absolutan aŭtoritaton en tiu ĉi religio. Kaj kvankam troviĝas 84,000 darmaj pordoj kaj multe da skoloj, ĉiu el ili iel rilatas al Lia prediko. La kanono de Budhismo aŭ la aro de la skribitaj tekstoj, en kiuj la instruoj de Budho estas registritaj, estas nomata *Issaikyō* (*Issaikjoo*) aŭ *Daizōkyō* (*Daizookjoo*) en la japana, t.e. kompleta kolekto de la sankta skribo.

Ŝakjamunio forte akcentis la egalecon de homoj, kaj Li donis sian instruon en simplaj vortoj de ĉiutaga uzo, por ke ĉiu ajn povu sufiĉe kompreni ilin. Li daŭrigis sian predikon al multaj homoj ĝis la lasta minuto, kiam li forpasis en la aĝo de okdek jaroj.

Post la forpaso de Ŝakjamunio Liaj disĉiploj daŭrigis predikadon laŭ tio, kion ili iam aŭskultis. Tamen povis esti, ke ili iom erare aŭskultis aŭ erare memoris la enhavon de la instruo laŭ la paso de multaj jaroj. Sed la vortoj de Ŝakjamunio ĉiam devas esti heredita ekzakte kaj korekte.

Ŝanco aŭskulti la instruon devas esti garantiata al ĉiuj homoj egale. Tial multe da veteranaj monaĥoj kunsidis por ordigi kaj kombini vortojn kaj instruon per recito de tion, kion ili memoris. Ili pasigis multe da monatoj por ilia diskuto. La koncilio por la redaktado estas nomata *saṃgīti* en la sanskrito. Tio ĉi montras, kiel pie kaj sincere ili provis heredi la vortojn de la granda instruisto. Tiamaniere oridigita instruo poste estis skribita per literoj, kaj ankoraŭ pli poste al ĝi aldoniĝis komentarioj aŭ interpretoj fare de eminentaj monaĥoj. La aro de la komentarioj kaj interpretoj estas nomata Abidarmo (*Abhidharma* sanskrite, *Abhidhamma* palie). Kaj la moralaj reguloj de la Samgo estas nomata Vinajo (*Vinaya* sanskrite kaj palie). Budhisma kanono konsistas el la tri partoj: Sutro, Vinajo kaj Abidarmo. Tial la

kanono kiel la tuto estas nomata Tripitako (*Tripitaka* sanskrite, *Tipitaka* palie), laŭlitere signifanta “tri korbojn”, japane *Sanzō*. Preskaŭ ĉiuj skoloj tenadis sian propran kanonon. Ĝis hodiaŭ postvivis tri versioj: palia kanono apartenanta al Teravada Budhismo, ĉinlingva kanono apartenana al Mahajama Budhimo, kaj tibetlingva kanono apartenana al Tibeta Budhismo. El ili la palia kanono estas la plej kompleta kaj sistema.

Tradicie oni diras, ke Budhismo estis enkondukita en Ĉinion en 67 p.K. dum la regado de Reĝo Ming de la Donghan-dinastio (25-220 p.K.) Sed efektive, se diri kun certa pruvo, en la jaro 151 dum la regado de Reĝo Huan de la Donghan-dinastio Budhisma sankta skribo estis enkondukita kaj tradukita. Ĉar Mahajana Budhismo jam estis establita en Hindio ĝis tiam, la tekstoj de pratempa kaj Mahajana Budhismoj ambaŭ estis alportitaj al Ĉinio sen distingo. Ekde tiam dum pli ol 1,700 jaroj la klopodo por traduko de la sankta skribo al la ĉina lingvo daŭris. La nombro de tradukitaj tekstoj atingis 1,440 titolojn kaj 5,586 volumojn (tiutempe tekstoj estis skribitaj en skribrulaĵo). La klopodo por konservado de tiuj ĉi tradukaĵoj en kompleta formo komenciĝis jam en la Wei-dinastio (220-265), kaj ĉirkaŭ la periodo de Beisong-dinastio (960-1127) komenciĝis ilia presado. Intertempe la verkoj de ĉinaj majstraj monaĥoj ankaŭ estis aldonitaj al la Budhisma kanono. Pro tio jam ne estas taŭge nomi tiun en la ĉina versio “Tripitako”-n en la strikta senco de la vorto. En la tempo de Sui-dinastio oni ekuzis la nomon “*Issaikyō*”, kolekto de ĉiuj sanktaj tekstoj, kaj en la tempo de Tang-dinastio (618-907) oni ekuzis ankaŭ la nomon “*Daizōkyō*”, granda kolekto de sanktaj tekstoj.

En la 7-a jarcento Budhismo estis enkondukita en Tibeton kaj dum ĉirkaŭ 150 jaroj, de la 9-a ĝis la 11-a jarcento, klopodo por la tradukado de la Budhanaj tekstoj daŭris, kaj preskaŭ ĉiuj el ili estis tradukitaj en tiu ĉi tempo.

La sanktaj tekstoj estis tradukitaj ne nur en la korean, japanan, sinhalan, kamboĝan, turkan kaj preskaŭ ĉiujn orientajn

lingvojn, sed ankaŭ en la latinon, francan, anglan, germanan kaj italan lingvojn. Vidante tiun ĉi fakton, oni povas diri, ke la beno de la instruo de Budho disvolviĝis en ĉiuj anguloj de la mondo.

Sed aliflanke, se rigaridi el la vidpunkto de kvalito de la traduko kaj la historio de la religia evoluo kaj sortoŝanĝo dum pli ol du mil jaroj kun dek mil aŭ pli multaj volumoj tradukitaj kaj eldonitaj, ŝajne estas ankoraŭ malfacile kapti la veran signifon de la vortoj eligitaj de Ŝakjamunio, eĉ kun la helpo de *Daizōkyō*. Tial estas nepre necese ĉerpi esencajn punktojn el *Daizōkyō*, kaj farigi ilin normo aŭ fundamento, sur kiu oni povas bazi sian fidon al la religio.

En Budhismo la plej supera aŭtoritato estas la vortoj de Ŝakjamunio. Tial la instruo de Budhismo devas esti la instruo, kiu estas firme kunligita al nia ĉiutaga vivo. Se ne, sankta libro, kiom ajn multe da volumoj, ne sukcesas instigi la homan menson el la profundo al fido al la instruo. En ĉi tiu senco, por ke la instruo estu nia propraĵo, estas dezirate, ke sankta libro estu klara, simpla, senpartia, sufiĉe riĉa por prezenti la tuton, preciza, kaj familiara al vortoj de nia ĉiutaga vivo.

Tiu ĉi libro estas kompilita sub la konsideroj supre menciitaj, heredante la grandan fluon de la *Daizōkyō* havanta la historion de dumil kaj kelkcent jaroj. Kompreneble ni ne povas diri, ke tiu ĉi eldono estas perfekta en sia enhavo. La vortoj de Ŝakjamunio estas senlime profundaj en sia signifo, kaj Lia virto estas tiel vasta, ke ni ne povas facile aprezi ĝin. Ni sincere deziras, ke tiu ĉi libro estu pli kaj pli bonigita, proksima al vero, kaj altvalora, plurfoje eldoniĝante kun revizio. Por tio ni petas de vi samideanoj konsilon kaj kritikon.

HISTORIO DE “LA INSTRUOJ DE BUDHO”

Ĉi tiu “La Instruoj de Budho” estas kompilita kaj reviziita surbaze de la originala japanlingva eldono de “Nove Tradukita Budhisma Teksto” publikigita en julio 1925, de “la Disvastiga Asocio de Nove Tradukita Budhisma Teksto” estrita de s-ro Muan Kizu. La unua japanlingva eldono estis kompilita ĉefe de d-roj Shūgaku Yamabe kaj Chizen Akanuma, kunlabore kun multaj aliaj budhismaj kleruloj en Japanio. Por publikigi ĝin ili bezonis preskaŭ 5 jarojn.

En la Shōwa-erao (1926-1989) “Populara Eldono de Nove Tradukita Budhisma Teksto” en la japana estis publikigita de la sama Disvastiga Asocio kaj vaste distribuita tra Japanio.

En julio, 1934, kiam la Konferenco de la Tut-Pacifika Budhana Junularo okazis en Japanio, “*The Teaching of Buddha*”, la angla traduko de la supre menciita “Populara Eldono de Budhisma Teksto” estis publikigita de la Tut-Japana Budhana Junulara Federacio, kun la helpo de s-ro D. Goddard, kiel unu el la memorigaj projektoj. En 1962, festante la 70-jaran datrevenon de la enkonduko de Budhismo en Usonon, s-ro Ehan Numata, prezidanto de la Mitutoyo Kompanio, publikigis la alian anglalingvan eldonon “*The Teaching of Buddha*”.

En 1965, kiam s-ro Numata fondis Budhisman Misian Asocion per sia ofermono, li celis disvastigi tra la mondo tiun ĉi “La Instruoj de Budho” kiel unu el la ĉefaj taskoj de la Asocio.

Por realigi tiun ĉi planon, revizia komitato estis establita en 1966. Ĝi konsistis el profesoroj Kazuyoshi Kino, Shūyū Kanaoka, Zennō Ishigami, Shinkō Saeki, Kōdō Matsunami, Shōjun Bandō kaj Takemi Takase. Prof. Fumio Masutani, s-roj N.A. Waddell kaj Toshisuke Shimizu ankaŭ helpis la revizian laboron. Tiamaniere la angla-japana dulingva eldono de “*The Teaching of Buddha*” estis publikigita en nova stilo.

En 1972, profesoroj Syūyū Kanaoka, Zennō Ishigami, Shōyū Hanayama, Kansei Tamura kaj Takemi Takase, korektinte tipografiajn erarojn, rekompilis la angle tradukitan tekston.

Poste, komitato konsistanta el profesoroj Ryōtatsu Shioiri, Takemi Takase, Hiroshi Tachikawa, Kansei Tamura, Shōjun Bandō, kaj Shōyū Hanayama (ĉefredaktoro) estis organizita por rekompili la japanan version de “La Instruoj de Budho”, kaj tiu ĉi versio estis eldonita en 1973.

Denove, en 1974, komitato konsistanta el profesoroj Kōdō Matsunami, Shōjun Bandō, Shinkō Saeki, Dōyū Tokunaga, Kansei Tamura kaj Shōyū Hanayama (ĉefredaktoro) estis organizita por rekompili la anglan version “*The Teaching of Buddha*”, kiun oni faris kunlabore kun s-ro Richard R. Steiner. Tiu ĉi estis almetita al la japana versio (eldonita en 1973), kio rezultigis la eldonon de la angla-japana dulingva versio.

En 1978 profesoroj Shigeo Kamata kaj Yasuaki Nara aliĝis al la komitato. En 2001, profesoroj Kenneth Tanaka, Shōgō Watanabe, Yoshiyasu Yonezawa, kaj Sengaku Maeda (nuna ĉefredaktoro) aliĝis al la editora komitato.

En 2013, la Societo por Promocio de Budhismo (*the Buddhist Promoting Society*) ŝanĝis sian organizan statuton de “Fondusa Jura Persono” al “Publik-Interesa Fondusa Jura Persono.” Okaze de tiu ĉi ŝanĝiĝo, la editora komitato rekonstruis sian membraron kun profesoroj Sengaku Maeda (ĉefredaktoro), Zennō Ishigami, Kiyotaka Kimura, Kenneth Tanaka, Makio Takemura, Yasuaki Nara, Chizuko Yoshimizu, Yoshiyasu Yonezawa, kaj Shōgō Watanabe. Depost 2017, kun prof. Makio Takemura servanta kiel la nova ĉefredaktoro, la komitato kunvenis ĉiujare por fari “La Instruojn de Budho” efektive respondanta al la bezonoj de la nuntempa socio.

Junio, 2017

Pri Esperanta Traduko

En aŭgusto 1980, kiam la 67a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Yokohama, en la fakkunsido de Japana Budhana Ligo Esperantista (JBLE), ni decidis traduki kaj eldoni “La Instruojn de Budho” en Esperanto. Por tiu ĉi projekto, s-ro Ehan Numata, prezidanto de “Budhisma Misia Asocio” donis plenan subtenon inkluzive de la financa helpo, kaj konsentis eldoni kaj disdoni tion.

La komitato konsistis el la jenaj personoj.

prezidanto: Yosiaki Miwa

vicprezidantoj: Sanĉi Asano, Tisyô Wakizaka

komitatanoj: Shonosuke Issobe, Kenzen Minami, Ryûei Samura,

Tizuko Tadaisi, Tetuo Yamasita, Tetuo Nose, David MacGill

Yukiko Hayasi, Masaki Imai, Yûiti Yamasaki, Hirosi Ikeda,

Tadao Yosida, Zirô Kitahara, Sidoo Ŭataru, Fuzimaru Dazai

Ni volas esprimi la plej sincerajn dankonjn al s-ro Masao Kakuo, kiu afable reviziis la tradukaĵon, kaj al s-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektoro de Japana Esperanto-Instituto, kiu donis valorajn konsilojn kun entuziasma subteno.

Aŭg. 1981.

Pri la Dua Eldono de Esperanta Traduko

Laŭ la peto de Budhisma Misia Asocio, Japana Budhana Ligo Esperantista reviziis kelkajn partojn koresponde al la nova angla versio.

Feb. 2020

Pri la Tria Eldono de Esperanta Traduko

Tuj post la eldoniĝo de la dua eldono, Yamaguti Sin'iti entreprenis la totalan revizion de la Esperanta traduko. Yamamoto Osamu kunlaboris al tio kaj provlegis la manuskripton. Rezulte, ne nur traduka stilo sed ankaŭ terminoj ŝanĝiĝis al pli natura Esperanto.

Jan. 2022

INDEKSO DE ĈIUTAGA VIVO

<i>Homa Vivo</i>	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
Signifo de vivo	5	10
Reala stato de ĉi tiu mondo	96	20
Ideala vivmaniero	235	6
Malbona vidpunkto pri vivo	44	19
Ĝusta ideo pri vivo	41	7
Antaŭjuĝo de vivo	57	6
Al homoj perdiĝintaj (Fablo)	127	4
Vivo de homo (Fablo)	90	16
Se oni sekvas vivon avaran kaj pasian (Fablo)	90	3
Instruo de maljuno, malsano kaj morto (Rakonto)	93	17
Morto neevitebla (Rakonto)	94	21
La kvin aferoj, kiujn neniu povas plenumi en ĉi tiu mondo	48	11
La kvar veroj en ĉi tiu mondo	49	1
Iluzio kaj Vervekiĝo ambaŭ devenas de menso	49	13
La dudek aferoj, kiuj estas malfacile plenumi, sed valoraj por homoj	133	10
<i>Fido</i>		
Fido estas fajro	179	15
Fido havas tri signifojn	181	7
Fido estas revelacio	182	12
Fido aperas en sincera menso	181	16
Malfacile estas trovi veron, kiel blinduloj apenaŭ		

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
priskribi precizan formon de elefanto (Fablo)	75	2
La vera instruo de la Budho montras, kie		
la Budha-naturo ekzistas (Fablo)	77	19
Pasio kaŝas la Budha-naturon (Fablo)	73	15
Dubo baras fidon.....	183	1
La Budho estas patro, homoj estas Liaj filoj	35	19
Saĝeco de la Budho estas tiel vasta kaj		
profunda kiel granda maro	34	11
Menso de Budho estas plena de granda kompato	15	1
Kompato de Budho estas eterna	16	4
Budho ne havas fizikan korpon	13	17
Budho predikis tra sia tuta vivo	23	16
Budho uzis la fikcian metodon de		
vivo kaj morto por persvadi homojn	23	16
Budho savis homojn el ilia sufero per		
la rimedo de fablo	19	8
alia fablo.....	20	1
La mondo de Vervekiĝo	236	19
Rifuĝo al la Budho, la Darmo kaj la Samgo	178	6
Lernado de la vojo teni moralordonon, praktiki		
la koncentriĝon de menso, kaj agadi saĝe	163	10
La Nobla Okera Vojo	166	14
Ses vojoj por atingi la alian bordon de Vervekiĝo	168	16
Kvar ĝustaj proceduroj	168	6
Kvar ĝustaj vidpunktoj	165	16
Kvin kapabloj por akiri Vervekiĝon	168	11
Kvar senlimaj statoj de menso	171	6
Homoj kiuj komprenas la Kvaroblan Noblan Veron	39	14
Morto de homo kaj efemereco de vivo	12	19

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
Recitulo de la nomo de la Amida-Budho		
naskiĝas en Lia lando de Purego	113	3
Faru lumon el vi mem, konfidu al vi mem	10	15
<i>Ekzercado de Menso</i>		
Distingi tion, kio estas por vi la plej grava (Fablo)..... ..	150	9
Gardu vin de via unua paŝo	133	5
Neniam forgesu tion, kion vi serĉas (Fablo)	150	4
Por atingi sukceson oni devas toleri multe		
da malfacilaĵoj	158	16
Streĉu vin eĉ en ripetitaj malsukcesoj (Rakonto)	172	21
Ne maltrankviligu vin eĉ en mizera		
cirkonstanco (Rakonto)	124	3
Komprenanto kaj obeanto de la Nobla Vojo similas		
al homo, kiu eniras en mallumon kun lanterno	40	8
Oni trovas instruon ĉie, kie ajn li iras (Rakonto)	161	18
Homo inklinas movi en la direkto, al kiu		
lia menso gvidas	121	18
La plej grava punkto de la instruo estas en		
tio, ke oni regas sian menson	11	13
Regu vian menson antaŭ ĉio	212	1
Se vi regas vian menson	122	1
Diversaj statoj de la menso (Fablo)	118	11
Menso neniam estas la ego-personeco	46	14
Neniam permesu la menson ŝanceligi vin	10	18
Venku vian menson	154	11
Estu la mastro de via menso	11	19
Ĉiuj malbonoj venas de korpo, buŝo kaj menso	87	5
Rilato inter menso kaj vortoj	125	15

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
Via korpo estas nenio alia ol prunteprenita (Rakonto) ..	143	12
Ĉi tiu korpo estas plena de ĉiuspecaj malpuraĵoj	130	21
Ne estu avida je aĵoj	10	18
Tenu viajn korpon, buŝon kaj menson puraj	123	12
Neniam deflankiĝu, sed klopotu (Rakonto)	172	6

Homa Sufero

Homaj suferoj devenas de alligiteco de menso	43	3
Kiel defendi sin kontraŭ suferoj	13	7
Iluzio kaj malsaĝeco estas la enirejo e Vervekiĝo	59	13
Kiel liberigi sin el suferoj	116	1
Kiam varma fajro de pasio estas estingita, tiam pura Vervekiĝo estas atingebla	142	6
Amoravido vere estas la fonto de iluzio	85	17
Amoravido estas vipuro kaŝita en floroj	85	21
Neniam havu alligitecon al brulanta domo (Fablo)	19	17
Pasio estas la fonto de eraroj (Fablo)	118	4
Ĉi tiu mondo estas en brulanta fajro	82	20
Avideco je la fameco kaj honoro bruligas homojn	119	8
Avideco je la riĉeco kaj volupto ruinigas homojn	119	14
Diferenco inter saĝulo kaj malsaĝulo	134	8
Malsaĝulo neniam sciiĝas pri sia eraro (Fablo)	141	7
Malsaĝulo envias bonan feliĉon de aliulo nur surbaze de rezulto	141	11
Agmaniero de malsaĝulo (Fablo)	147	3

Ĉiutaga Vivo

Donu oferadon, sed forgesu via agadon.....	169	19
--	-----	----

Indekso

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
La sep specoj de donado	170	1
Metodo akiri riĉecon (Rakonto)	145	17
Metodo akiri feliĉon	132	17
Neniam forgesu afablecon ricevitan (Rakonto)	139	10
Diversaj karakteroj de homoj	89	7
Malfeliĉo ĉiam sekvadas la deziron de venĝo	132	5
Metodo kvietigi la senton de indigno (Rakonto)	231	10
Neniam maltrankviliĝu pri riproĉo de aliulo (Rakonto)	122	14
Homo ne vivas por vestaĵo, manĝaĵo aŭ ŝirmilo	205	9
Manĝaĵo kaj vestaĵo ne estas por komforto nek por plezuro	117	1
Kiamaniere vi devas pensi okaze de manĝado	208	8
Kiamaniere vi devas pensi okaze de vestiĝo	207	10
Kiamaniere vi devas pensi okaze de dormado	209	1
Kiamaniere vi devas pensi kiam estas varme aŭ malvarme	208	11
Kiamaniere vi devas pensi pri via ĉiutaga vivo	206	11
 <i>Ekonomio</i>		
Ĝusta uzado de aĵoj (Rakonto)	221	1
Posedaĵo neniam restas eterne	220	11
Ne amasigu monon sole por vi mem.....	223	12
Metodo akiri riĉecon (Rakonto)	145	17

Familia Vivo

La familio estas la loko, kie la membroj venas

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
en kontakto kun aliaj	218	7
Agoj kiuj difektas familion	213	5
Vojoj per kiuj oni rekompencas grandan ŝuldon al siaj gepatroj	217	20
Ĝusta vojo inter filoj kaj gepatroj	213	21
Ĝusta vojo inter edzo kaj edzino	214	19
Edzo kaj edzino devas havi saman kredon (Rakonto)	222	6
 <i>Vojo por Senhejmaj Monaĥoj</i> 		
Homo ne estas senhejmaj gefratoj nur pro ke li vestiĝas kiel monaĥo kaj recitas sutron	197	5
Senhejmaj gefratoj ne estas heredantoj de la templo kaj ĝia posedaĵo	194	1
Avareca homo neniam fariĝas vera monaĥo	194	7
La vera vivo, kiun senhejmaj gefratoj devas sekvi	196	1
 <i>Socia Vivo</i> 		
Signifo de komuna socio	226	11
Efektiva stato de komunumo en ĉi tiu mondo	96	20
Tri specoj de organizaĵoj	226	16
Vera komunuma vivo	227	7
La granda lumo, kiu lumigas la mallumon	225	7
Harmonio en homa rilato	227	20
Rimedo por harmonio de komunumo	229	5
La idealo de la eklezia societo	228	6
La socia idealo de la budhanoj	236	11
Tiu ruiniĝos, kiu malordigas ordon (Fablo)	140	10
Tiu ruiniĝos, kiu estas ĵaluza kaj kverelas		

Indekso

	<i>Paĝo</i>	<i>Linio</i>
kun aliulo (Fablo)	140	10
Respektu maljunulon (Rakonto).....	135	1
Agmaniero de studanto al sia instruisto	214	10
La leĝo de amikeco	215	4
Elektado de bonaj amikoj	216	13
Rilato inter mastro kaj liaj servistoj	215	13
Konduto al krimulo	223	19
Grava punkto kiu koncernas instruanton de la Darmo	198	15

SANSKRITA GLOSARO
(laũ Alfabeto Ordo)

ANĀTMAN (Neegoo)

Tiu ĉi termino montras unu el la plej fundamentaj doktrinoj de Budhismo: ĉiuj ekzistaĵoj kaj fenomenoj en la mondo ne havas sian substancon, kiun oni povas kapti. Ĉiuj religioj en Hindio antaŭ Budhismo asertis, ke ĉiu ekzistaĵo enhavas senŝanĝan substancon, kiu estas nomata egoo ĉe homa ekzisto. Sed Budhismo neis egoon kaj instruis, ke ĉiu ekzistaĵo ne estas konstanta. Ĉar ĉiu ekzistaĵo aŭ fenomeno ne estas eterna, ili ne havas substancon nek egoon.

ANITYA (Nekonstanteco)

Alia fundamenta doktrino de Budhismo. Ĉiuj ekzistaĵoj kaj fenomenoj en la mondo ĉiumomente ŝanĝiĝas, kaj nenio restas en la sama stato. Per tiu ĉi ideo Budhismo klare montras malsaman starpunkton ol aliaj religioj. Budhismo instruas kvar ŝtupojn: ĉio naskiĝas, daŭras, ŝanĝiĝas kaj poste estingiĝas; observante, ke ĉio estas nekontentiga, tion ni devas fari la ŝancon por nia religia introspekto. De starpunktoj de diversaj skoloj naskiĝis diversaj metafizikaj analizoj, sed ni ne devas enfali en pesimismon nek nihilismon, ĉar kreiĝo kaj disvolviĝo ankaŭ faras unu flankon de nekonstanteco.

AVIDYĀ (Malvido)

La stato, en kiu oni ne havas pravan saĝon. Tio estas malsaĝo, kiu estas la fundamento de iluzio. En ĉiu skolo analizoj kaj klarigoj estas diverse faritaj, sed ĉiu markas ĉi tion kiel la motivan forton, kiu instigas blindan pasion. Laŭ la tezo pri la dek du kaŭzo-rilatoj, kiu klarigas la rilaton inter kaŭzo kaj rezulto de ĉiu ekzistaĵo per dek du ŝtupoj, sur la unua ŝtupo situas tiu ĉi malvido. Oni povas diri, ke ĝi estas blinda volo de avido en vivado.

BODHISATTVA (Bodisatvo)

Origine tiu ĉi vorto indikis Ŝakjamunion, kiu ankoraŭ estis sin ekzercanta antaŭ sia vervekiĝo. Poste ĝi aplikiĝis ĝenerale al viv-estaĵo serĉanta Vervekiĝon. Precipe en Mahajana Budhismo tiu ĉi vorto havas pli vastan signifon kaj inkludis la tutan aron de Mahajanaj Budhanoj, t.e. tiuj, kiuj praktikadas celante Vervekiĝon, kaj tiuj, kiuj klopodas por gvidi aliajn homojn al Vervekiĝo. Plie imagitaj aŭ ne realaj sanktuloj, ekzemple Avalokiteŝvaro aŭ Ksitigarbo, kiuj havas transcendan forton, ankaŭ nomiĝas Bodisatvo. Oni kredis, ke tiuj ĉi sanktuloj, ŝargante parton da laboroj de Kompato kaj Saĝo de Budho, kiel vicsavantoj aperis responde al homaj ĉagrenoj.

BUDDHA (Budho)

Laŭvorte “vekiĝinto” kiel komuna substantivo.

En la komenco de la historio de Budhismo ĝi indikis Ŝakjamunion aŭ Gautama Siddhārtha, fondinton de Budhismo, ĉar Li atingis la staton de Vervekiĝo en sia aĝo de 35 jaroj antaŭ ĉ. 2500 jaroj en Hindio. La finfina celo de ĉiuj budhanoj estas, sendepende de diversaj skoloj aŭ tradicioj, fariĝi Budho. Rilate la diferenco de rimedoj por atingi tiun ĉi celon, Budhismo dividiĝis en plurajn skolojn. En Mahajana Budhismo, krom historia Budho Ŝakjamunio, multaj Budhoj, kiel ekzemple Amitābha (Amitabo), Mahāvairocana (Mahavajroĉano), Bhaiṣajyaguru, k.t.p. estas ĝenerale akceptitaj kiel simboloj de la instruo.

En Japanio influite de la koncepto de Purlanda Budhismo, kiu asertas, ke homoj fariĝas Budho, post kiam ili renaskiĝas en la Purlando, oni nomas ĉiujn forpasintojn HOTOKE (Budho en la japana lingvo).

DHARMA (Darmo)

Tiu ĉi vorto havas multajn difinojn rilate al la religiaj tradicioj de Hindio, inkluzive de Hinduismo, Budhismo, kaj Ĝajnismo Ĝi estas centra teologia aŭ filozofia koncepto de Hindiaj religioj, kiu plejofte rilatas al homaj devoj, sed ankaŭ al la instruaj normoj pri ĉi tiuj devoj kaj eĉ la rezultoj de devoplenumado.

En la malfrua Budhisma tradicio, la vorto eksignifis unue la tutan instruaron de Budho, due la devojn aŭ la farindajn praktikojn laŭ ĉi tiu instruo, kaj trie karaktereco aŭ propreco en filozofia senco. Laŭ la unua signifo, Budhismo mem estas fundamente la darmo kaj ankaŭ ĝi funkcias kiel nomo de la tradicio. En la budhisma triopo Budho-Darmo-Samgo, ekzemple, la Budho estas la instruanto, Darmo la instruo kaj Samgo la instruistaro. La darmo ĉi tie precipe estas la bazaj kaj objektiva veroj, kiujn laŭ budhismo ĉiu Budho denove eltrovas.

HETU-PRATYAYA (Kaŭzo-Kondiĉo)

Kaŭzo kaj kondiĉo. Kaŭzo estas rekta motivo, kiu naskas rezulton, kaj kondiĉoj helpas la naskiĝon el ekstero aŭ estas sekundara motivo. Ĉio aperas kaj malaperas laŭ kaŭzo kaj kondiĉoj. Por eniri en Buhismon estas necese akcepti la leĝon de kaŭzo-kondiĉo. Vidu ankaŭ “pratīya-samutpāda”.

KARMAN (Karmo)

Ĝenerala signifo de tiu ĉi vorto estas “agado”. Sed kutime ĝi estas uzata en la senco de “potenciala forto” kiel rezulto, kiun alportas antaŭa agado. Ĉar unu ago certe alportas rekompenco, bonan aŭ malbonan kaj feliĉan aŭ malfeliĉan, ĝia influa forto estas rigardata kiel karmo. Tiel karmo estas preskaŭ samsignifa kiel rekompenco de la agado en antaŭa mondo. Plie estas tri kategorioj de karmo: korpa, parola kaj mensa.

KLEŚA (Kleŝo, Pasio)

Ĉia spirita agado de homoj, kiu malhelpas efektivigon de Vervekiĝo. Multaj el homaj deziroj ligitaj kun homa vivo ĉagrenas, malordigas kaj ĝenas homan korpon kaj menson. Ilia fonto estas avido kaj alkroĉiĝo, kaj bazas sin sur vivforto mem. Avido, kolero kaj malvido estas ĝiaj fundamentoj, el kiuj naskiĝas multaj aliaj pasioj. Ĉar tiuj ĉi pasioj estas malhelpaĵoj de Vervekiĝo, oni devas estingi ilin en la procezo de praktikado. Sed ankaŭ estas alia pensmaniero, kiu aprobas la pasion kiel saltilon al Vervekiĝo.

MAHĀYĀNA (Mahajano)

En la daŭro de Budhisma historio, aperis du ĉefaj tradicioj: Mahajano kaj Teravado. Mahajana tipo de Budhismo disvastiĝis en Tibeto, Ĉinio, Koreio, Japanio k.t.p. Dume Teravado disvastiĝis en Birmo, Srilanko, Tajlando k.t.p. “Mahajano” signifas “Grandan Veturilon,” kiu povas akcepti suferojn de ĉiuj viv-estaĵoj en ĉi tiu mondo de naskiĝo-kaj-morto, kaj veturigas ilin sendistinge al la stato de liberiĝo.

MADHYAMĀ-PRATIPAD (Meza Vojo)

La vojo ekskludanta du ekstremojn. Tio montras la pozicion de Budhismo. Tial en ĉiuj skoloj de Budhismo la ideo de la meza vojo estas estimata kaj alte taksata. Tio signifas ne nur moderan vojon. Ĝi estas la vojo, kiu forigante alteniĝon al io penetras egale en la aktualecon. Ĝi neas du kontraŭajn ekstremojn kaj aŭfhebas ilin, ekzemple, esto / malesto, konstanteco / malkonstanteco, k.t.p. Oni povus kompreni ĝin kiel dialektikon.

MAITRĪ-KARUṆĀ (Kompato kaj Favoro)

La du konceptoj, ofte kuniĝinte, faras la fundamentan etikon de Budhismo. Kompato estas “doni feliĉon al aliaj viv-estaĵoj”, kaj Favoro “forigi suferon de ili”. Vervekiĝinto posedas tiun ĉi etikon kaj amas egale ĉiujn viv-estaĵojn. La Bodisatvoj Avalokiteŝvaro kaj Ksitigarbo simbolas tiun ĉi spiriton.

NIRVĀṆA (Nirvano)

Signifas laŭvorte estingon aŭ trankvilon; estingon de deziroj, avido, malamo, iluzio, kaj alkroĉiĝo. Ĝi havas du aspektojn: Nirvano kun resto kaj Nirvano sen resto. La unua estas la stato de Vervekiĝinto ĝis lia korpa morto, kaj la dua estas tiu de Vervekiĝinto postmorte. Budho Ŝakjamunio do eniris en la unuan Nirvanon de la unua aspekto, kiam li vervekiĝis en la aĝo de 35 jaroj, kaj eniris en la duan aŭ absolutan Nirvanon, kiam lia korpo neniigis.

PĀLI (Palio)

Lingvo uzata en Teravada Budhismo. Oni kredas, ke la plej malnova kanono estis transskribita en tiu ĉi lingvo. Ĝi estas unu el la prakritoj, parol-lingvoj aŭ popol-lingvoj en la norda Hindio, dum Sanskrito estas skriba aŭ klasika lingvo por kleruloj. Palio estas parenca al Sanskrito, sed ne estas ĝia ido. Ŝakjamunio mem siatempe uzis probable alian prakriton.

PĀRAMITĀ (Perfekteco, Paramito)

Etimologie, laŭ la sanskrita gramatiko, ĝi povas esti analizita en “pāramī” (la plej alta) kaj “-tā” (sufikso de abstrakta substantivo). Do ĝia signifo estas “perfekteco” aŭ “pleja alteco”. Poste tamen en Ĉinio kaj Tibeto oni elpensis alian analizon, ke ĝi konsistas el “pāram” (tien)

kaj “ita” (irinta). Tiukaze, oni tradukas ĝin en Esperanton kiel “atingi la alian bordon” aŭ “atingi la mondon de nirvano”.

Mahajana Budhismo emfazas praktikon el la ses eroj de “pāramitā”: donaco, observo de preceptoj, pacienco, klopodo, meditado kaj saĝo. En Japanio unusemajna periodo de printempa kaj aŭtuna ekvinoskoj estas nomata “higan” (japanlingva traduko de paramito) kaj en tiuj ĉi periodoj entuziasmaj budhanoj praktikas la ses-eran paramiton.

PARIṆĀMAṆĀ (Transdono)

Transdono de meritoj akumulitaj pere de bonaj agoj. Estas du okazoj: transdoni por sia propra vervekiĝo en estonteco, kaj por aliaj viv-estaĵoj. Reciti sutron en la okazo de funebra ceremonio estas unu tipo de tiu ĉi transdono, tiel oni kredas, ĉar mortintoj jam ne povas fari bonajn agojn kaj necesas, ke iliaj parencoj aŭ amikoj faru bonon anstataŭ mortintoj.

PRAJÑĀ (Saĝeco)

Saĝecon, intuicio, profunda kompreno. En budhismo ĝi markas intuician komprenadon de la kvar noblaj veroj kaj intuician enrigardon en la tri principojn (nekonstanteco, sufero, neego), kiuj kondukas al Nirvano. En Mahajana Budhismo oni uzas tiun ĉi terminon precipe por kompreno de ŝunjato. Kaj el la ses paramitoj, tiu de saĝeco faras la plej gravan kaj fundamentan, ĉar ĝi ebligas la aliajn kvin.

PRATĪYA-SAMUTPĀDA (Laŭkondiĉa Estiĝo)

Laŭkondiĉa estiĝo (aŭ dependa estiĝo) estas budhisma filozofia teorio, kiu asertas, ke ĉiuj estaĵoj ekestas depende de aliaj estaĵoj. Troviĝas la simpla formulo: kiam tio ĉi estiĝas, tio estiĝas; se tio ĉi

malestiĝas, tio malestiĝas. Ĝi estas ne spekulativa sed praktika teorio, kiu aplikiĝas al la solvo de sufero kaj al Nirvano.

PRAVRAJANA (Forhejmiĝo)

Forlasi hejman vivon kaj fariĝi monaĥo. En Hindio ĉi tia praktikado sen hejmeco estis rigardata kiel ordinara afero.

SAMGHA (Samgo)

Komunumo de disĉiploj de Budho. En frua tempo, ĝi konsistis el monaĥoj kaj monaĥinoj. Poste, kiam la Mahajana movado ekestis, laikaj disĉiploj viraj kaj virinaj, kiuj ekzercas sin cele al iluminiĝo, ekhavis sian pozicion en la Samgo. En tiu ĉi kazo la Samgo konsistas el kvar: monaĥo, monaĥino, upasako (laika kredanto vira), upasakino (laika kredanto virina).

SAMŚĀRA (Sansaro, Metempsikozo)

“Vagado” aŭ “mondo”, kun kunsenco de cirkla rondiro. Ĝi ankaŭ temas pri la teorio de renaskiĝo kaj la cikleco de ĉiuj vivoj, aferoj, ekzisto, fundamenta parto de ĉiu darmo. Oni ofte parolas pri sansaro per vortoj kiel metempsikozo, transmigrado, karma cirklo, reenkarniĝo, cirklo de sencela drivado, vagado kaj banala ekzisto. Ĝi ofte estas bilde prezentata en “rado de vivo”.

SANSKRIT (Sanskrito)

Sanskrito estas eble la plej antikva hindeŭropa lingvo ankoraŭ aktive uzata; ĝi apartenas al la hindarjaj lingvoj en la hindirana lingvogrupo de la hindeŭropa lingvofamilio. Iam oni kredis Sanskriton la plej praa el ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, sed poste oni trovis ke la hitita,

ankaŭ hindeŭropa, estas eĉ pli malnova. Sanskrito, kiu signifas “pura” aŭ “gramatike ĝusta” lingvo, estas sankta lingvo de pli ol 1 miliardo da homoj (precipe hinduoj kaj mahajanaj budhanoj; aliflanke la kanonaj tekstoj de la teravada budhismo, de la ĝajnismo kaj de la sikismo estas verkitaj en pli novaj lingvoj). Oni taksis, ke hodiaŭ ĝis du milionoj da homoj ĝin parolas kiel duan lingvon, kaj nuntempe oni skribas novan sanskritan literaturon.

ŚŪNYATĀ (Ŝunjato)

Ideo, ke “ĉio, kio ekzistas en la mondo, ne havas substancon nek egoon.” Ĉar ĉio en la mondo ekzistas de kaŭzo-rilato, senŝanĝa egoo ne ekzistas en ĝi. Tial ni devas ne esti alteniĝanta al la ideo, ke egoo ekzistas aŭ neekzistas. Ĉar homoj aŭ aĵoj ekzistas relative kaj interdepende, ni devas ne esti alteniĝantaj al unu ekzistaĵo nek unu doktrino, nek devas rigardi ion kiel absolutaĵo. Ĉi tio estas la fundamenta ideo de sutroj apartenantaj al “Prajñā-pāramitā” (perfektigo de saĝeco).

SŪTRA (Sutro)

Sankta teksto, precipe pri prelego de Ŝakjamunio aŭ de liaj eminentaj disĉiploj. La vorto signifas origine “fadeno”. Unu el la tri eroj de Tripitako.

STHAVIRAVĀDA (Teravado)

“Instruo de la plejaĝuloj”, la budhisma skolo bazita sur la palia versio de la Tripitako kaj ĝiaj mezepokaj komentarioj, disvastiĝinta precipe en Suda-Azio (Srilanko, Birmo, Tajlando, Laoso kaj Kamboĝo); foje erare konfuzita kun hinajano. Komparu ankaŭ mahajano.

TRIPITĀKA (Tripitako)

Origina signifo laŭvorte estas “tri korboj”; estas la tuto de budhisma kanona tekstaro konsistanta el la tri kategorioj: sutro, vinajo kaj komentario de hindaj monaĥoj. La versio de Teravado estas ĝenerale nomata Palia Kanono. Ankaŭ en Mahajano oni havas pluraj versiojn de Tripitako, sed malsame de la Teravada, la Mahajanaj Tripitakoj inkluzivas aliajn derivitajn tekstojn kaj komentariojn, kiuj estis verkitaj pli poste en aliaj landoj ol Hindio.

VIJŅAPTI-MĀTRATĀ (Konsciismo)

Unu el la mahajanaj skoloj, kiu asertas, ke ĉio ekzistas nur en la konscio, kaj ke ĉiuj fenomenoj estas manifestaĵoj de la ok konscioj: vido, aŭdo, flaro, gusto, tuŝo, penso, ego-konscio, kaj la plej profunda kaj kaŝita konscio, kiu naskas aliajn sep konsciojn. Malsame ol spiritualismo, kiu asertas, ke menso estas la bazo de la mondo, budhisma konsciismo diras, ke ankaŭ menso estas efemera.

VIMUKTI / VIMOKṢA (Liberiĝo)

Liberiĝo el la iluzia mondo, nome el la mondo de metempsikozo kaj eniro en Vervekiĝon aŭ Nirvanon. Budho estas tiu, kiu liberiĝinte el tiu ĉi iluzia mondo, estante for de ĉiuj katenoj, akiris tutan liberecon.

PRI “BUDHISMA MISIA ASOCIO”

Antaŭ ol paroli pri Budhisma Misia Asocio, ni devas mencii unu japanan industriiston nomatan Ehan Numata, kiu estas la fondinto de “Mitutoyo Akcia Kompanio”, kiu produktas precizan mezurilon.

Post kiam li fondis tiun ĉi kompanion en 1934, li estis firme konvinkita, ke la sukceso de ĉiuj entreprenoj dependas tute de harmonia kuniĝo de ĉielo, tero kaj homo, kaj ke perfektigo de humaneco povas esti atingita nur pere de la bona akordiĝo de saĝeco, kompato kaj kuraĝo. Li faris ĉion, kion li povas, sub tiu ĉi konvinkiĝo, cele al la teknika plibonigo de mezurila produktado kaj al disvolviĝo de homa menso.

Estas lia kredo, ke la realigo de mondpaco estas ebla nur surbaze de perfektigo de humaneco, kaj ke Budhismo estas religio por tiu ĉi celo. Tial, dum li direktadis sian kompanion, li klopodis por disvastigo kaj modernigo de Budhismaj muzikoj, kaj por disvastigo de pentraĵoj kaj instruo de Budho.

En decembro de 1965 li fondis fonduson oferinte sian privatan havaĵon por entrepreni disvastigon de Budhismo kaj samtempe por kontribui al mondpaco. Tiel estis establita Budhisma Misia Asocio kiel publika organizaĵo.

Kiamaniere ni povas disvastigi la instruon de Budho tra la mondo, por ke ĉiuj homaj estaĵoj povu profiti de ĝi kaj ĝui Lian grandan saĝon kaj kompaton? Jen, trovi la solvon de tiu ĉi demando estas la tasko de Budhisma Misia Asocio laŭ la intenco de la fondinto.

Resume dirite, ĉiaj eblaj klopodoj celantaj la disvastigon de Budha instruo estas ĝuste la koro kaj spirito de tiu ĉi Budhisma Misia Asocio.

Kiam ni rigardas retrospekte la longan historion de Japanio, kvankam ni havas la kulturon de Budhismo kiel nian gloron, ĝis nun ni ne havis veran Sanktan Skribon de la japana maniero en la vera senco de la vorto. Tiu ĉi libro “La Instruoj de Budho” estis publikigita sur tia memkritiko.

Tiu ĉi libro servas kiel spirita “nutraĵo” por ĉiu ajn, kiu legas ĝin. Ĝi estas preparita tiel, ke oni povu meti ĝin sur sian skribtablon aŭ kunporti kun si, kaj ĉiam ajn povu legi ĝin. Tiamaniere oni povas kontaktiĝi vive kun la spirito de Budhismo.

Kvankam ĝi ne estas tiel perfekta, kiel ni esperis, la nuna versio de “La Instruoj de Budho” naskiĝis dank’ al laborado kaj klopodado de multaj volontuloj por prezenti al modernuloj adekvatan, facile legeblan, kaj aŭtentikan enkondukon en Budhismon kun praktika gvido kaj ĉiutaga fonto de inspiro.

Budhisma Misia Asocio deziras, ke tiu ĉi libro eniru en multajn hejmojn, estu tenata de multaj homoj, kaj ili duŝi sin per la lumo de instruo.

Opinioj de legantoj estas bonvenaj. Bonvolu senhezite ĉiam ajn turni vin al la Asocio.